

2019-07-21

Kvara raporto de ILEI pri la 52-a Kongreso en Ĉaĉak, Serbio

Unue jen korekto de la Tria Raporto :

Dutaga Konferenco komencigis ĵaude matene. Pro la fakto, ke la Konferenco prezentas pli ol dek prelegojn, ĝi fariĝis integra parto de la programo de la Teknika Altlernejo, kie la Kongreso okazas. Proks. 15 studentoj kaj profesoroj de la universitato partoprenas la eventon, kiu okazas en feria periodo. **Tiu partopreno alportas al la profesoroj poentojn en ilia kariero.** Komence aŭdiĝis tri prelegoj de serbaj studentoj kun traduko al Esperanto. Post la unua prelego en Esperanto kun traduko al la serba, la loka publiko anoncis, ke la tradukado devas ĉesi : «Ni komprenas sufiche Esperanton !». Kaj tiel okazis. En la programo estis unuhora enkonduka kurso pri Esperanto por ili, tamen ili volis, ke ni metu tri horojn. Kaj tion ni faris.

Dum konkluda debato de la Konferenco la serbaj profesoroj substrekis sian kontenton aŭdi pri la uzo de virtualaj rimedoj en universitatoj el diversaj mondopartoj; tia malfermiteco ne estas kutima por ili, kiel ĝi estas por ni esperantistoj.

Dum la konkluda debato de la Kongreso la grupo de la komencantoj ricevis atestilon. Negativa konstato estas la neapero de la Kongresa Libro, kiu estas en preparo kaj estos printita por la bibliotekoj kaj arkivejo de ILEI en Herzberg. Pri diversaj farendaj decidoj la Komitato devos rete voĉdoni en la venontaj monatoj. Venis konstato, ke la strukturo de ILEI nepras, pro respekto al la pasintaj gvidantoj kaj atingoj, pro kontakto kun la internaciaj instancoj kiel UN kaj UNESKO, sed ke la Ligo devas evolui laŭ la evoluo de la nuna mondo kaj de la bezonoj de la membroj en ĉiuj aĝoj. Aplauĝoj kaj donacoj venis al la Loka Kongresa Komisiono. Riĉa prezento de Kanado, Kebekio kaj Kebekurbo informis la kongresanaron pri la eventoj de la jaro 2020.

Resume la Kongreso okazis en belega lando kaj en bonega etoso, kaj estis tre fruktodona.

13 kongresanoj saltis al Finnlando per Air Serbia sabate matene por partopreni la Universalan Kongreson de UEA.

Raportas la prezidanto Mireille Grosjean